

BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO ĈE
OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2.



No 5.

Julio 1953

Aperas laŭbezone

LETNÍ KOLEJ ESPERANTA V DOKSECH.

Z technických důvodů letošní kolej je pořádána na hradě Kostí v Českém ráji od 5. do 15. srpna 1953. Počet účastníků je omezen na 60. Ubytování v hotelu, v soukromí nebo ve společné noclehárně. Koupání v místě. Informace žádejte: s. Karel Šolc, Mladá Boleslav III., Janáčkova ul. 566.

-. -

Al la 38a Universala kongreso en Zagrebo aliĝis ĝis la 31a de majo 1400 personoj. Unu strato en Zagrebo ricevos la nomon de D-ro Zamenhof.

-. -

HEROLDO DE ESPERANTO. Ni ekspedas 135 ekz. de tiu revuo al aktivuloj en la tuta respubliko kaj al adresoj, kiujn ni ricevis de la eldonejo. Ni konstatas kun plezuro, ke la revuo estas ĉie kun ĝojo akceptata, ĉar preskaŭ por ĉiuj ĝi signifas la solan ligilon kun la tutmonda movado esperantista. Ni ricevis jam grandan amason da dankaj leteroj kaj ni transdonas tiujn dankojn al la eldonisto s-o Teo Jung, kiu per sia malavara donaco ĉi tiel subtenas la ĉeĥoslovakajn esperantistaron.

Troviĝas tamen 2-3 samideanoj, kiuj ne ĝuste komprenas nian taskon kaj tre energie postulas pli rapidan kaj pli regulan liveron de Heroldo de Esperanto. Tio okazis ekzemple ĉe la okazo, kiam ili ne ricevis la n-ron 8/1178. Ni klarigas, ke ni la ricevitajn kvanton ekspedis post alveno laŭ nia adresaro, ne povante atenti, ĉu iu havas pli aŭ malpli grandan rajton ĝin rapide ricevi. Ni esperis, ke venos la sekvan tagon la resto, sed okazis laŭ ne antaŭvidebla kaprico de nia poŝto, ke tiu registrita pakaĵo estis resendita al la presejo. La presejo provos ĝin ekspedi denove, en kiu okazo ĝin ricevos ĉiuj restintaj legantoj. Tiaĵoj okazis pasintjare plurfoje, nunjare alvenis ĝis nun preskaŭ sen ĝeno ĉiuj numeroj de la 1-a ĝis la 10-a. Ni uzas la okazon por denove peti ĉiujn ricevantojn, ke ili disponigu sian numeron por lego al ĉiuj esperantistoj en sia ĉirkaŭaĵo, al la membroj de la ekzistantaj aŭ ĉesigitaj grupoj.

Ostrava kaj Vsetín en Moravio, Cheb kaj Rokycany en Bohemio, atentu! Ni nenion aŭdis pri sorto de ekzempleroj de Heroldo, kiujn ni sendis por grupo en Cheb al s-o Fr.Vrchota, al Kroužek esperantistů Komenského 27 en Rokycany, al E-a rondeto de ROH en ĉefa stacidomo de Ostrava kaj al s-o J.Zajíc por la esperantistoj de Vsetín. Ni urĝe petas, ke en okazo de neintereso estu al ni resenditaj la ricevitaj numeroj, por ke ni povu kontentigi samideanojn en aliaj lokoj. Se tiuj lokoj deziras pluan liveron, ili sendu al ni tuj 12 Kčs por la elspezoj. Ni atentigas ĉe tiu okazo denove, ke la revuo ne estas abonebla.

-. -

EL POPOLA ĈINIO. La lasta numero, kiun ni vidis de tiu interesa revuo de niaj ĉinaj amikoj, estas de marto nunjara. Ni esperas, ke temas sole pri prokrasto. Niajn leterojn la eldonejo ne respondis.

-. -

EKSTERLANDAJ ESPERANTO-GAZETOJ. Kelkaj eldonejoj sendas nun sian gazeton al nia klubo. Ili akceptu nian koran dankon por la subteno. La gazetoj estas ĉe la klubo je ĉies dispono. "Esperanto en Skotlando" sendis plurajn ekzemplerojn de sia interesege lasta numero kaj ni dissendis la numerojn kune kun Heroldo al lokoj, kie ni atendis bonan utiligon.

-.-

Opavské Junularo sděluje, že táborová letní škola esperanta v přírodě v údolí Moravice poblíže Hradce u Opavy, která se loňského roku velmi osvědčila, bude letos organisována ve dvou skupinách po 14 dnech. Prvá skupina bude pro mírně pokročilé, druhá pro funkcionáře esperantských skupin. Informace podá Blažena Kuzníková, Rooseveltova 17, Opava.

-.-

Kroužek esperantistů záv. org. ROH jámy Dukla v Dolní Suché II vydal cyklostilovanou učebnici esperanta pro kursy i samouky. Cena Kčs 9,-. Adresa: Emil Kliszma, Dolní Suchá II., okr. Karviná.

-.-

Písenné kursy esperanta jsou pořádány pro ty zájemce, kteří se nemohou zúčastniti kursů osobně. Do kursů je možno se přihlásit kdykoliv a odkudkoliv. Adresa: Fr. Pytloun, Stráž nad Nisou, okr. Liberec.

-.-

Ĉiun bonan Esperanto-libron ni aĉetas. Proponojn sendu al Jar. Šustr, prez. de Esperantista klubo, Dlouhá 10, Praha I.

-.-

Radioamatora vortaro kvinlingva de O.Ginz estas serĉata. Skribu al O.Ginz Nad cementárnou 10, Praha-Podolí.

-.-

C.M.Cather, Ramleh (Egipto) - Kiu konas la adreson de tiu ĉi samideano, bonvolu ĝin doni al nia klubo.

-.-

Esperantista likvoro kaj malkovro de ĝia sekreto.

Ĉeĥaj esperantistoj certe atentis antaŭ pluraj jardekoj, ke aperadis en vendejoj kaj restoracioj likvoro, kies botelo estis ornamita per nia kvinpinta verda stelo kaj kiu portis eĉ la surskribon "Verda Stelo". Kiel ĝia fabrikanto estis notita iu sinjoro Dynybyl el Praha-Žižkov. Iuj samideanoj sole atentis kun intereso, aliaj eĉ iomete indignis pro malbonuzo de nia emblemo por malbeninda alkoholaĵo. Pro iu el tiuj ĉi motivoj foriris proks. en la jaro 1920 la vigla s-o Waldstein (mortigita - ho ve! - dum la germana okupacio) serĉi sinjoron Dynybyl. Li trovis lin en unu el la krutaj stratoj de Žižkov kaj demandis lin ĝentile, kio igis lin elekti esperantistan stelon por sia likvoro. La misio de s-o Waldstein malsukcesis. Dynybyl ne donis al li ian klarigon kaj deklaris sole, ke la nomo al li plaĉis. Li ne estis esperantisto kaj ne diris, de kie venis la ideo pri tiu nomo en lian kapon.

Nun, post proksimume tridek jaroj, ni trovis la klarigon. Ni hazarde kunvenis en Praha-Podolí kun s-o Budínský, esperantisto delonge eksa. Ankoraŭ dum epoko de Aŭstrio-Hungario li praktikis Esperanton kaj eĉ lia edzino konservis ĝis nun esperantan lernolibron el kurso, kiun ŝi vizitis proks. en 1908. Kaj tiu ĉi s-o Budínský laboris ĉe s-ro Dynybyl kaj li estis tiu, kiu proponis ornami iun speciale bonan - eble verdkoloran - likvoron per nia stelo kaj doni al ĝi la nomon "Verda Stelo".

Ne ekzistas plu la likvoristo Dynybyl, sed memoras lin malnovaj Žižkovanoj. Ne plu estas havebla lia likvoro "Verda Stelo", sed tion ne bedaŭras eĉ la plej sentimentalaj esperantistoj. Ili preferas meti verdan stelon sur sian surtuton, por montri, ke malgraŭ ĉio daŭras vivi nia lingvo.

-.-

O.G.

Al ĉiuj niaj membroj kaj legantoj ni deziras agrablan libertempon!

-.-